

UNUAJ SPERTOJ PER HC 900

Kaŭze de programverkado mi bonŝance disponis kelktempe pri unu el la unuaj hejmkomputeroj **HC 900**, produktita de VEB Mikroelektronik Mühlhausen en GDR. Mia antaŭa skeptikeco rapide cedis konvinkon pri la kvalitoj de la aparato.

La aĉetanto ricevas la *bazan aparaton*, apartan klavaron, kasedon kun BASIC-interpretilo kaj programoj, manlibron kaj instrulibron pri BASIC. La komputero havas 16 kByte-storregionon liberan por programoj de uzanto, 16 kByte-storon por la ekranbildo (disdividita en 320x256 bildpunktoj, kolorstoro, karakterstoro, liberaj restas ĉ. 1,5 kByte) kaj operacian sistemon sur 4 kByte. La komputero sin anoncas per menu-bildo. Eblas ŝargi plurajn programojn, kies nomoj estas aŭtomate metataj en la menuon.


Ege altkvalitaj estas la *magnetofonaj rutinoj*. Ŝargado de sur kasedo kaj registrado de programoj tuj sukcesis, kvankam mia kased-magnetofono estas nek tro bona, nek tro nova. La programoj estas identigeblaj kaj vokataj per nomoj. Ĉiu registrata bloko estas ekrane indikata kun numero kaj signo pri sukcesa (<) aŭ erara (?) legado.

La *klavaro* estas ligita al la baza aparato per 1,5-metra kablo kun ĵako-kontaktilo. Tio estas avantaĝo, ĉar oni povas sidigi ie ajn, nur prenante la malpezan klavaron kun si. Por loĝejo, kiu ja ne ĉiam disponas pri komputerteknika skribo- aŭ labortablo, tio gravas. La klavoj similas tiujn de poŝkalkulilo, sed ili estas pli grandaj kaj facile manipuleblaj. Ses libere programeblaj klavoj donas liberecon por programverkado.

Malpli bonaj estas la karakteroj. Ili estas kvadrataj (matrico 8x8). La ekrano konsistas el 32 linioj kun po 40 karakteroj. Por mia malgranda televidilo tio signifas, ke mi povas malproksimiĝi de ĝi ne pli ol 2 metrojn por rekoni la tekstojn sur la ekrano. La koloroj de fono kaj malfono estas programeblaj, tiucele ekzistas reĝima programo en la menuo.

La BASIC-interpretilo liverata surkasede estas konsiderinde povuma. Ĝi lasas 5000 bajtojn liberajn por verkendaj aŭ ŝargeblaj programoj. Krom la kutimaj matematikaj kaj karakteraj funkcioj ĝi permesas unu- kaj dubajtan skribadon kaj legadon de storo, sonigadon kaj grafikaĵojn.

Michael LENNARTZ



HC-900, baza aparataro kaj klavaro kun magnetofono